

Savu la balenojn!

Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 2000
Numero 43 (vol. 8, no. 1)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 43 (volumo 8, numero 1), Januaro-Februaro 2000

Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: esk@poboxes.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:
esperfed@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road,
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elk-
overtigis vian novan ekzempleron de
Esperanto sub la Suda Kruco: "Ni vere
bezonas artikolon pri ...?" Do sendu
tiun amatan eseon, ideon, rakonton,
esprimon de vidpunkto, leteron, dese-
gnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kon-
tribuon per e-poŝto, sur komputila
disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ
sur papero. Se vi sendas sur papero, la
teksto devas esti klare tajpita per freŝa
rubando. Tajpu sur nur unu flankon de
ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj lin-
ioj. Netajpitaĵajn manuskriptojn ni ne ak-
ceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti
kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de
ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aper-
igo. Laŭbezone teksto povas esti mal-
longigita. Pri la enhavo de artikolo
respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Aliaj Ricevitaj Libroj	6
Retmesaĝis Kep Enderby	7
Ŝanĝo de la statuto de AEA	8
Al Kep Enderby	8
Eŭro kaj Esperanto	9
Plu pri Herbert Koppel	10
Ret-adresoj de Aŭstralaziaj Esperantistoj	12
Sukcesis en la ekzamenoj	13
Radio 3ZZZ	13
Diversaĵoj	14
Eŭropa somero kongresa tempo	19
Dezirata korespondi	21
Raporto de la estrarkunsidoj de NZEA	22
El la regionoj	23
Rubriko de Odlo Bokserp	25
Recenzoj: <i>Australia Felix</i> (D.B.)	3
<i>Hejma Vortaro</i> (D.B.)	5

ESK estas legebla per la Interreto:
<http://www.poboxes.com/esk/>

Limdato por artikoloj por la marta nu-
mero: 15 februaro.

Kovrilbildo: Desegnita de Paige, en St
Mary's Primary School en Warners Bay en
NSW. Dank' al Greenpeace Australia:
[http://www.greenpeace.org.au/
globalwhalesanctuary/gallery_warners.html](http://www.greenpeace.org.au/globalwhalesanctuary/gallery_warners.html)

AUSTRALIA FELIX de Trevor Steele

RECENZAS DONALD BROADRIBB

TAKSO: 🍌🍌🍌🍌🍌

Australia Felix de Trevor Steele. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1999. 132p., broŝ.



Trevor Steele

Ĉi tiu nova libro de rakontoj kolektas spertojn de Trevor Steele pri lia vivo en Aŭstralio. Tri jam aperis en *ESK*: “La raketo de

Freddy revenas”, “La sunleviĝa ceremonio”, “Koro kaj kapo” — ĉiuj en 1993.

La plejparto de ĉi tiu novelkolekto estas nova por niaj legantoj: “Liberiga perspektivo”, sperto pri emigrinto, finiĝanta kun tre malkvietiga pesimismaĵo; “La stultulo”, tre komika raporto pri venĝo kontraŭ dormejestro en lernejo, farita de...nu, vi scias kiu kulpis.

“Por savi nigran animon”, estas la plej longa (50 paĝoj) kaj plej sociologia el la rakontoj, kiu memorigas nin pri la “tragedio de la ĵusaj du jarcentoj” rilate nian agadon kontraŭ Aborigenoj. Trevor resum- as la pensmanieron de tiu tempo:

Kristanismo, kaj aparte la moderna protestanta kristanismo, estas la plej matura formo de la spirita vivo, en kiu la homo plej konscias pri sia **individua**... respondeco antaŭ Dio pri la propraj agoj... Ĉiuj aliaj kred-sistemoj okupas ian propran lokon sur la gamo inter individuismo kaj kolektivismo... Unuekstreme estas

kristanismo, aliekstreme la... pensmaniero de la plej primitiva popolo sur la Tero, nome la aŭstraliaj indiĝenoj.

Iu ajn, kiu vizitas loĝejojn de aborigenoj, estas ŝokegata de la degenerado, kiu rekte rezultas el tiu manko de individua respondeco... kial la aborigenoj mortas trojunaj, malbone sin nutras, portas ĉifonvestojn, estas tute aŭ grandparte analfabetaj, vivas en deprimaj cirkonstancoj, loĝas troope, estas malsanaj, sekse malĉastas, pugnobatas sin, estas alkoholdependaj kaj senlaboraj... se eĉ ne menciis la absolutan mankon de vera religio?

Tamen, la rakonto ne estas prediko pri la tiama vidpunkto de la “balanda” loĝantaro Aŭstralio.¹ Temas pri rakonto pri specifa evento. Nome, la “savo de la animo” de aborigena junulino, Gloria.

Gloria estas tre bela, kaj tre ĉasta, servistino de maljunulino en la vilaĝo Chiverton. Misiemulo deci-

¹ = “neaborigeno”. Trevor klarigas la originon de tiu vorto: “Antaŭ jarcentoj nederlandaj maristoj alvenis por plenumi ekspresan liveron de kanonkugloj inter la nekristanajn sovaĝulojn. Siaflanke la ĉi-lokuloj donis lignon al la vizitantoj, foje en la dorson, foje en la intestojn... antaŭ ol la matĉo komenciĝis, la vizitantoj sciigis ke ili estas “hollander”. Kompreneble tio iĝis baldaŭ ‘balanda’, ne nepre komplimentvorto.” (p.121-122.)

das konverti ŝin al siaj vidpunkto kaj pensmaniero. Nome, apartigi ŝin de la Aborigena komunumo kaj kvazaŭcivilizigi ŝin.

Nu, Gloria, siaflanke, enamiĝas kun tre bela kaj tre inteligenta Aborigena rugbe-ludisto, Chad, amoremema junulo kies amoremo forte celas al (sed neniel limigas sin al) Gloria.

Sed la misiisto malaprobas la burĝonantan interamon.

Chad estis ia enkarniĝo de ĝustetio, kio estis nedezirata. Li estis 'for-rabita bebo', kiu ricevis bonan kristanan edukigon, sed forĵetis tiun ne-aĉeteblan perlon kaj nun laŭdire konfuzate pilgrimadis serĉe al ia 'aborigena spiriteco' (tiel!), kiun li supozis esti supera al kristanismo.

Efektive, ĉi misiulo tre forte malaprobas la "bebo-rabadon", sed tio ne modifas lian malfavoran opinion pri la aborigena kulturo.

Celante konverti Chadon al sia formo de Kristanismo, li paroladas longahore al li. Fine, li demandas al Chad pri lia reago:

"Nu, mia kara junulo, kion vi opinias pri tio?"

Chad parolis tre mallaŭte. "Mia opinie...merdo."

"Kio-o-o!?" La malgranda korpo subite rektiĝis, kvazaŭ pikite de abelo.

"Mi diris, ke ĝi estas merdo. Danĝera merdo... Ĝis revido."

Kompreneble la misiisteto ne povas akcepti tiun deklaron, do li decidas tuj ĉesigi la interrilaton de Gloria kun Chad. Li raportas al Gloria ke:

Li estas danĝera pro iuj supraĵaj kvalitoj kaj lia kapablo foje ĝentile konduiti. Sed bonŝance li lasis fali sian maskon kaj per la plej krudaj vortaĉoj, fivortoj — ne, mia Gloria, mi ne povus ripeti ilin — li surkraĉis ĉion noblan.

Li do konvinkas ŝin edziniĝi kun alia Aborigeno, kiu estis jam forsendita aliloken por lin "savi".

Tia estas la skeleto de la tre multenhava kaj pripensiga histori-novelo. Aliaj, multe malpli longaj, noveloj sekvas en la libro: "Samuel Birrubali Rossiter"; "La koroboria vespermanĝo", dek-ok-paĝa novelo pri ekstazia dancado de Aborigena trupo antaŭ ne-tre-sincera Ministro pri Aborigenaj Aferoj kaj ĉi ties kunuloj. Tevor verve strebas, ne tute sukcese, mergi nin en tiun ekstaientuziasmon.

Sekvas "Koro kaj kapo" (el *ESK* 1993); "Orienten el Perto", vinjeto pri la piedekskurso farita de Trevor el Brisbano al Darvino; "Inter novaj amikoj" — spertoj kun Aborigenoj; kaj "Amo al muŝoj".

Per siaj noveloj (kaj ne nur ĉi tiuj) Steele pravas ke li rangas apud Ferenc Szilágyi kaj Stellan Engholm kiel mastro de la novelarto. □

Gastiganto: "Via nomo estas Johano, ĉu ne? Mi neniam forgesas ies vizaĝon!"

Gasto: "Fakte mi nomiĝas Kolino!"


Gastiganto: "Jes, mi neniam povas memori ies nomon!" [El *Tamen Plu*]

HEJMA VORTARO

RECENZAS DONALD BROADRIBB

Takso: ☹ ☹ ☹

Hejma vortaro, red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: UEA, 1999. 62p., broŝ.



Jam de pluraj jardekoj ekzistas denaskaj Esperantistoj, t.e. personoj kiuj parolas Esperanton kiel sian unuan lingvon, krome pluraj geedzaj paroj diversakiale parolas Esperanton kiel sian kutiman hejman lingvon.

Tamen, ĝis nun malmultaj vortaroj priatentis nomojn por multaj el la ĉiutagaj enhejmaj objektoj kiuj malofte aperas en literaturo sed estas konstante bezonataj en la reala vivo. Parte tiun neglekton kaŭzis ke denaskuloj kaj iliaj gepatroj ne povis facile interkomuniki kaj diskuti kun aliaj familioj siajn apartajn problemojn. Nun tio ŝanĝiĝas, ĉar per la Interreto — en kiu la diskutgrupo DENASK-L estas viglega — ankaŭ la denaskuloj fariĝas internaciuloj.

Kiel nomi Esperante tiun objekton postulatan de ĉiu bebo, la “dummy/pacifier”? La denaskuloj interakordas: *suĉumo*. Kiel nomi la tre necesan “nappy/diaper”? Nu, *vindajo*. Kaj “bandaid”? (*Pret*)*pansaĵo*. Ĉu “instant coffee”? Provu *tujkafo*. Certe pli taŭgaj ol la *pacigilo*, *beb-tuko*, *bandaĝ(et)o*, kaj ? proponitaj

en la vortaro de Benson.

Estas interese, kaj grave, rimarki ke kelkaj socie eksmodaj terminoj nun aplikatas al pli laŭmodaj signifoj, ekz. *vindaĵo* al “nappy” anstataŭ “swaddling” kc.

Por “a hit” (*furorkanto*), “cotton wool” (*vato*), “potty” (*pis*)*poto*, “au pair” (*gastvartist[in]o*) Benson rezinis eĉ provdoni terminon.

Plej grava problemo pri la *Hejma vortaro* estas la manko de indekso. Ĉiuj vortoj listiĝas laŭ alfabeto ordo, en Esperanto, kun tradukoj en la Angla, Finna, Franca, Germana, Hebrea, Hispana, Hungara, Itala, Japano, Nederlanda, Portugala, kaj Rusa lingvoj. Sed sen trastudi la tutan libron, oni vane provus trovi la Esperantajn terminojn por, ekz., *carrycot* (litkorbo), *detergent* (*lesivo*), *poo* (*kaki*), *swing* (*pendolilo*), *toilet trained* (*puruma*), ktp.

Multaj ĉiutage bezonataj terminoj mankas (*microwave*, *peanut butter*...), nomoj por ĝardenajoj (*posthole digger*, *watering hose* ...) ktp. ktp. Tamen, komenco farita estas pli bona ol nefarita.

Do, kun viaj tri tasoj da kafo, sidigu, tralegu, grincu perdente, ridetu pro plezura trovo, diskutu kun viaj edz(in)o, infano(j), kaj pensu. La libron vi trovos valora. □

ALIAJ RICEVITAJ LIBROJ PRIPAROLAS DONALD BROADRIBB

August Strindberg: *Sonĝodramo*. Tr. el la Sveda Sten Johansson. Skövde (Svedio): Al-fab-et-o, 1999. 80p., broŝ. Takso: 🍷🍷🍷🍷

Dramteksto de mondfama dramverkisto (August Strindberg: 1849-1912). La dramo premieris en 1907. La traduko estas klara kaj altkvalita, facile utiligebla por surscenigo de la dramo.

Temas pri vizito de Filino de la (Hinda) Dio Indro al la tero, por trovi kial oni surtere tiom malgajas. Nu, ŝi multon spertas, kaj ekkomprendeblas. Tre pesimisma, tre Absurdismostila dramo. □

Hjalmar Söderberg: *La pelto, kaj dek kvar aliaj noveloj*. Tr. el la Sveda Sten Johansson. Skövde (Svedio): Al-fab-et-o, 1999. 74p., broŝ. Takso: 🍷🍷🍷

Hjalmar Söderberg (1869-1941) estis tre sukcesa verkisto Sveda. Du aliaj verkoj liaj jam aperis en Esperanto, *La Kiso* (noveloj, en 1995) kaj *Doktoro Glas* (romano, en 1998). La ĉilibraj rakontoj, kiuj datas inter 1897-1907, estas tre bone tradukitaj kaj legiĝas relative glate. Preskaŭ senescepte ili estas tre pesimismaj vinjetoj pri viveventoj. Iom deprima legaĵo, se oni legas ilin unu tuj post alia. □

Mervyn Claxton: *Kulturo kaj sano*. Tr. el la Angla Helga Rapley.

Rotterdam: UEA, 1999. 42p., broŝ. Takso: 🍷🍷


Broŝuro verkita por UNESKO kaj WHO. Facile legata. La ĉefvidpunkto: "Tradicia medicino daŭre restas grava parto de sanprizorgo en multaj evolulandoj, kaj diversaj 'alternativaj' aŭ komplementaj terapioj estas vaste adoptitaj en evoluantaj landoj... Restas konstanta bezono por pli bona pritakso de la utilo ricevebla el alternativaj formoj de medicino, inkluzive de tradiciaj."

Ne ĉiam fidinda estas la enhavo de la verko. Ekzemple, sur p.20 estas dirite: "Post la enkonduko de la alkohola prohibicio [1919, en Usono], *cola*-trinkaĵoj kun aldonita kokaino anstataŭis la alkoholon. Oni deklaris kokainon la plej bona maniero eskapi de sklaveco al alkoholo..." Tamen efektive, kokaino ne plu estis parto de Coca Cola ekde 1905. Do ne ĉio legata estas kredinda... □

Red. D Blanke, R. McCoy kaj O. Buller: *Por aktiva lingvopolitiko*. Rotterdam: UEA, 1999. 71p., broŝ. Takso: 🍷🍷🍷🍷


Ses eseoj tre interesaj. Yamasaki Seikō verkas pri la fiaskintaj provoj reformi la skribsistemojn en Japanio kaj Ĉinio; Amri Wandel pri la evoluo de la Novhebrea lingvo en Israelo; Renato Corsetti pri la

demando ĉu Esperanto estas kreo-la aŭ piĝina lingvaĵo; Werner Bormann pri la “silentado” de la Akademio de Esperanto; Detlev Blanke pri kio estas “lingvopolitiko”: kiel stabiligi Esperanton, kaj kial? Kaj la enkonduka eseo de Humphrey Tonkin diskutas: “Kio estas lingvoplanado?” □

Tahar Ben Jelloun: *Paĉjo, kio estas rasismo?* Tr. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999. 52p., broŝ. Takso: 

Laŭ la enkonduko, ĉi tiu verketo originis el demandoj faritaj de la dekjara filino de la aŭtoro dum manifestacio kontraŭ kontraŭrasisma leĝpropono en Francio. Li diras ke li simpligis la vortuzon en la teksto kaj pliklarigis la konceptojn, pro spertoj kun aliaj infanoj.

Bedaŭrinde, la tradukintoj tute ne faris simplalingvan tradukon kiun facile komprenus Esperantista infano. Kaj la teksto estas tiom ripetoplena ke la leganto vere enuas. □

Betty Salt: *Lito apud la fenestro.* Rakontoj, teatraĵetoj, poemoj. Rotterdam: UEA, 1999. 108p., broŝ. Takso: 

Betty Salt (1907-1994) estis Kanada Esperantisto, kiu multe verkis en Esperanto kaj ankaŭ tradukis noveletojn kaj poemojn.

Pluraj el la rakontoj en ĉi tiu libro temas pri parapsikologiaĵoj, kiuj lasas la leganton iom dubema. Sed ĉio estas facile legata, kaj

distra. Kvankam la poemoj ne estas elstaraj ekzemploj de la poeziaro, ili havas sian valoron. La teatraĵetoj estas tre mallongaj, kaj verŝajne intencitaj por enkluba prezentado. □

RETMESAĜIS KEP ENDERBY:

Kunaŭstralianoj,

Mi esperas ke interesos vin scii ke antaŭ nelonge la Estraro de UEA decidis starigi specialan Pacifikan Oceanian Komisionon celante antaŭenirigon de Esperanto inter loĝantoj en la insuloj de la Pacifika Oceano. Similaj komisionoj jam ekzistas de multaj jaroj respondecante pri aliaj partoj de la mondo.

Renato Corsetti en Italio, Vicprezidanto de UEA, mi, kaj Brian Fox en Nov-Zelando estas inter tiuj kiuj laboros en la komisiono.

Ne surprize, nia unua paŝo devas esti decidi kiel plej bone atingi tiujn celojn kaj tiurilate, la espero estas ke Aŭstraliaj kaj Nov-Zelandaj Esperantistoj povos helpi. Mia peto al tiuj kiuj ricevas tiun ĉi retmesaĝon do estas ke, se estas iuj inter vi kiuj interesiĝas kaj posedas sciojn pri la situacio en la Pacifikaj insuloj aŭ havas kontaktojn tie kiuj eble povos helpi nin, bonvolu sendi tian informon al mi. Bonvolu, mi petas, menci la aferon en viaj kluboj por tie peti sugestojn. Sincere salutas Kep Enderby.

kependerby@bigpond.com □

ŜANĜO DE LA STATUTO DE AEA

El la kalkulado de la voĉdonoj, en la balotado por ŝanĝi la Statuton de Aŭstralia Esperanto-Asocio, rezultis 47 voĉoj por la proponita ŝanĝo kaj unu kontraŭ.

Sekve de tio, la fina frazo de paragrafo 10 de la Statuto nun tekstas:

“Junulaj membroj, kaj familiaj membroj aĝaj malpli ol 18 jarojn, ne havas voĉdonrajton.”

La rezulto estas, ke nun povas voĉdoni en la Asocio ne nur ordinaraĵoj, aliĝintaj, dumvivaj kaj honoraj membroj, sed ankaŭ familiaj kaj asociaj membroj aĝaj almenaŭ dek ok jarojn.

Komunikis Ron Gates □

POR RIDIGI VIN

Sherlock Holmes, la fama detektivo, kaj lia helpanto D-ro Watson foje estis kampadantaj. Dum la nokto Holmes vekiĝis kaj vekis Watsonon.

“Watson, rigardu la ĉielon kaj diru al mi kion vi vidas.”

“Mi vidas milojn da steloj.”

“Kaj kion vi deduktas el tio?”

“Astronomie, mi scias ke estas milionoj da galaksioj kaj bilionoj da steloj. Astrologie, mi rimarkas ke la planedo Saturno estas en la konstelacio Leono. Tempe, estas la tria horo. Meteorologie, mi kredas ke morgaŭ estos senpluve. Kion vi deduktas, Holmes?”

“Watson, iu ŝtelis nian tendon!”

[el *La Nigra Cigno*] □



“Ĉu mi ŝokiĝus se mi tretus sur la relon?”

“Ne, sinjorino, krom se vi metus la alian piedon sur la supran kablون!”

Bill Thorne

AL KEP ENDERBY NIAJN BONDEZIROJN POR RAPIDA RESANIĜO

Kep Enderby suferis koratakon kaj estis operaciita la 17an de decembro. Laŭ komuniko ricevita la 19an, la operacio estis sukcesa kaj nun li bone progresas.

Laŭ informo de Terry Manley □

EŬRO KAJ ESPERANTO

DE R. COLNEY



Eŭropanoj de la unua horo, la Esperantistoj, pli konsciaj ol aliaj popolanoj pri la internaj kaj eternaj luktoj de la Eŭropaj nacioj, revis pri la unuiĝo de sia kontinento.

Ja, dum jarmiloj la diversaj etnoj kiuj loĝis sur tiu terangulo, kvazaŭ apendico de ĝia giganta najbaro Azio, bataladis unuj kontraŭ la aliaj per senĉesaj militoj amasigantaj suferojn, kriplulojn, mortintojn, orfojn.

Jam antaŭ la du lastaj mond-militoj, Esperantistoj proponis la planon de pli unuigita Eŭropo. Tamen ili ne povis eviti la eksplodon de la katastrofegoj.

Tuj post la finiĝo de la dua mond-milito, fine iuj konsciĝis ke la teknikaj progresoj, la perspektivoj de kompleta detruo de la civilizacio per amasmurdiloj pli kaj pli perfektigitaj, fariĝas vera minaco por la homspecio.

Iom post iom politikistoj, ekonomiistoj, eĉ financistoj pritraktis la problemon kaj provis ĝin solvi laŭ sia maniero, lasante la Esperantistojn al ĉi ties revoj.

La rezulto de iliaj agadoj certe ne respondas al la revado, al la esperoj de la Esperantistoj, kiuj celis pli socie kaj kulture orientitan starigon.

Ja, ĉiam uzado de komuna ling-

vo estis cemento de vera unuiĝo, tial anstataŭ konstrui Eŭropon ĉirkaŭ ideoj certe iom abstrakaj aŭ tro idealistaj por iuj, politikistoj kaj aferistoj, kiuj ĝenerale estas pli pragmataj, oni konstruis kaj konstruas ĝin ĉirkaŭ materialistaj konceptoj el kiuj la plej videbla kaj oportuna estas mono.

Interŝanĝo de ideoj, de kulturoj, de spiritalaj valoroj transformiĝis en interŝanĝon de varoj kaj komerco kaj profitoj.

Tamen estis grandega progreso, ĉar tio fariĝis en plena interkonsento de 15 landoj, el kiuj jam 11 tuj aliĝis al la sistemo.

Tio estas la unua konkreta kaj pozitiva ago de la Eŭropa Unio.

Pro tio la 1-a de januaro 1999 estos unu el la plej decidaj datoj en la historio de unuiganta Eŭropo, ĉar unu el la plej simbolaj signoj de la nacioj, emisio de mono, fandiĝis en la fornego de la komuna varserva merkatego. Ĉiuj aliĝintaj landoj plenvole forlasis unu el siaj plej propraj prerogativoj profite al ne nur komuna, sed unika mon-sistemo.

La realeco de tutmonda ekonomio dank' al senprecedentaj progresoj de la produktado, de la komunikiloj, de la transportiloj ebligis tiun ŝanĝon kiu koncernas pli ol 350 milionojn da civitanoj.

Koncerne kelkajn landojn, nome Francion, la kreo de monunuo “Eŭro” estas libervola forlaso de la enlanda interŝanĝmezurilo.

Ni ne scias ĉu ne estas iom fantazie skribi pri “mezurilo” kiu ekzistas laŭnome jam de pli ol duonjarmilo, ĉar fundamente mezurilo devas havi firman konstantan kaj neŝanĝeblan bazon aŭ valoron. Tio ne estis la kazo de la Franca franko, kaj hodiaŭ ni ne povas prognozi pri la epizodoj de la vivo de la eŭro. Estas fakto ke naske la valoro de Franca franko egalas al arbitre taksata valoro ĉirkaŭ 3.80 gramoj da pura oro, dum en la lastaj jaroj de sia vivo, kvankam multobligite per cent en 1960, la valoro de la nova “peza” franko ne superis kelkajn oro-miligramojn.

Mono ja spertas la saman procedon kiel ĉio en la mondo: “erozio”. Ĝi iom post iom eluziĝas, senvalor-

iĝas, pereas.

Se oni aplikus al ĉiuj mezuriloj la samajn regulojn, la mezepoka metro (kiu tiam ekzistis nur sub la nomoj: klafto, colo, futo) longus ne pli ol milimetron

Do, en tiu historia tago, 1999.01.01, la plej granda parto de Eŭropo enŝoviĝis en novan mondon, tiun de eŭro, kiu vere enkorpiĝis je 2002.01.01 per apero de biletoj kaj moneroj.

Ĝis tiam estos transira periodo nomata “adapta” dum kiu privatuloj, laŭ reciproka interkonsento, povos paralele uzi du monojn, eŭron aŭ nacian monon, almenaŭ per interskriboj aŭ elektronikaj rimedoj. Kiam al ĝi algluiĝos la popoloj de la Eŭropa oriento, oni vere povos paroli pri paca, struktura revolucio.

[El *Eventoj*, n-ro 175, 1/novembro 1999.]□

PLU PRI HERBERT KOPPEL MORTINTA EN OKTOBRO 1999 KONTRIBUIS RALPH HARRY

Herbert Koppel ludis ŝlosilan rolon en Aŭstralia Esperanto-Asocio kiel sekretario, organizinto de landaj kongresoj, kaj redaktoro de nia gazeto, dum pli ol 40 jaroj inter 1950 kaj 1988.

Li naskiĝis en Aŭstrio kaj, kiel

knabo en Vieno, interesiĝis pri internaciaj aferoj. Renkontinte “Esperanton la internacian lingvon” ĉ. 1928 en kruc-vortenigmo, li aĉetis libron de D-ro Emil Pfeffer, *Esperanto en dek lecionoj*. Kun la helpo de Pfeffer, kiun li hazarde ren-

kontis, li trovis grupon kie li povis lerni la lingvon. Baldaŭ li fondis, kun Emil Vokal, la societon “Harmonio”, kaj organizis gazetservon por Aŭstria Esperantista Federacio. En 1937 li renkontis Esperantistojn en Parizo dum la Tutmonda Ekspozicio.

En 1939 Herbert migris al Anglio, fariĝis lernanto de inĝenierado. kaj vizitis la Esperanto-klubon de Londono. Sed pro la milito oni donis al li la statuson de “malamika fremdulo” kaj li estis sendita al Kanado. En sia interniga tendaro estis “universitato” en kiu li instruis la internacian lingvon. Post sia liberiĝo li laboris en militindustrio kaj fariĝis Kanada civitano. (Vidu “Who’s who in Esperanto” en *The Australian Esperantist*, marto 1980.)

La frato de Herbert estis irinta al Melburno, kaj Herbert kuniĝis kun li tie en 1948. Laŭvoje en Sidnejo li renkontis membrojn de la Sidneja Esperanto-Societo, inter ili Wre Chandler, John Matasin, kaj Kaethe Schwerin. Tuj post sia alveno al Melburno li helpis organizi komitaton por okazigi tutaŭstralian kongreson — neniu estis okazinta post la 6a en 1929. 101 partoprenis ĉi tiun kongreson, en 1950. Unu partoprenanto tre speciala por Herbert estis F-ino Faye Andres el Adelajdo. Ŝi kaj Herbert geediĝis en 1951.

En 1950 Herbert fariĝis Sekretario de AEA. Li respondecis pri 8

pliaj landaj kongresoj.. el kiuj tiun en Melburno en 1964 partoprenis 143. Herbert ĉiam aktivis pri la teatraĵoj kaj aliaj kulturaj aspektoj de la kongresoj. En 1972 li donacis ŝildon por Drama Konkurso, kiu stimulis la aktorojn en la Aŭstralia movado. Li mem partoprenis en ĉiu kongreso ĝis 1995.

En 1974 Herbert estis transpreninta de F. R. Banham la taskon redakti *The Australian Esperantist*, kaj li bone respondecis en tiu rolo ĝis 1988. Li certigis ke la gazeto plene spegulu la Esperanto-vivon de ĉiu parto de Aŭstralio, kaj multe faciligis la taskon de historiistoj.

En tiu sama jaro kiam la Asocio decidis krei honorsignon Fratulo de AEA “por Esperantistoj, kiu elstare laboris por AEA, kaj por Esperanto ĝenerale”, Herbert Koppel estis unu el la du inaŭguraj Fratuloj. □

POR RIDIGI VIN

Statistiko

Kion kutime faras viroj post la finiĝo de la vira-virina petolado duope en la lito (kvankam tiu meblo ne nepre estas necesa por tio!)? Laŭ la opinio de kelkaj fakuloj el la Antverpena Esperanto-Klubo, kiuj science esploris la temon:

- 10% tuj endormiĝas,
- 01% komencas studi la Esperantogramatikon,
- 04% ekfumas cigaredon,
- 85% rapide ellitiĝas, vestas sin kaj... iras hejmen!

[el *Eventoj* n-ro 170.] □

RET-ADRESOJ DE AŬSTRALAZIAJ ESPERANTISTOJ

BAZITA SUR LISTO KOMPILITA DE KEP ENDERBY

La liston iomete pligrandigis la redaktoro. Se via retadreso mankas ĉi tie kaj vi deziras listigi ĝin, bonvolu informi la redaktoron ĉe esk@poboxes.com. Ankaŭ bonvolu informi pri eraroj aŭ ŝanĝoj en la adreslisto.

Anderson, Kay

kjand@ozemail.com.au

Astrid, Erb

astrid@box.net.au

Ben Van, Poppel

benny@netspace.net.au

Bishop, Alan kaj Jenny

alan.bishop@education.monash.edu.au

Broadribb, Donald

enkidu@poboxes.com

Curry, Brian

brianc@acslink.net.au

Enderby, Kep

kependerby@bigpond.com

Felby, Bob

esperantobob@picknowl.com.au

Fox, Brian

brianandjackie@abztrak.co.nz

Franklin, Owen

oveno@hotmail.com

Furness, Margaret

furnessm@wch.sa.gov.au

Gallagher John

abcetc@ozemail.com

Gates, Ron

rgates@metz.une.edu.au

Grant, Jay

jgrant@ipswichcity.qld.gov.au

Grasby, Dallas

dallas.grasby@adelaide.edu.au

Green, Hazel

hazgreen@tmba.design.net.au

Heinze, Bernard

franciska@bigpond.com

Horvath, Sandor

shandorhorvath@unisa.edu.au

Inglis, Margaret

minglis@netspace.net.au

Lee, Kam

mpavlova@telstra.easymail.com.au

Linnane, Brendan

brendan.b.linnane@centrelink.gov.au

Lukes, Dianne

DianneLukes@netscape.net

Lutz, Miranda

lutz@alphalink.com.au

Manley, Terry

teren@mail.ans.com.au

McCarney, Debra

debra@aisnet.net.au

McDonald, Bradley

neelam@voyager.co.nz

Metev, Ĥristo

hmet@hotmail.com

Mojarrabi, Bahram

bmojarrabi@hotmail.com

Parkinson, W. Dudley
 parkinson@trump.net.au

Payne, Vera
 vpayne@cygnus.uwa.edu.au

Pease, Dennis dbp@ihug.co.nz

Poulson, David
 d.poulson@cowan.edu.au

Touballe, Franciska
 franciska@bigpond.com

Turvey, Alan
 turvey@fai.com.au

Turvey, Edna
 ednat@sydney.dialix.com.au

Vos, Penny
 penivos@yahoo.com

□

SUKCESIS EN LA EKZAMENOJ

INFORMAS MARCEL
 LEEREVELD

Baza: Eileen Jones (Suda Aŭstra-
 lio)

Meza: Brendan Linnane (Suda
 Aŭstralio)

Elementa kun honoro: David
 Whitmore (Viktorio)

□

RADIO 3ZZZ

GRAVA ANONCO


La estraro ne konsentas ke ni uzu
 nian monon por niaj riparoj aŭ ko-
 respondado aŭ abono al necesaj Es-
 perantaĵoj uzataj por preparo de la

Esperanto-programo en Radio
 3ZZZ.

Pro tiu ŝanĝo de la reguloj, sendu
 viajn donacojn por la Esperanto-
 programo ne plu al la adreso de
 3ZZZ, sed al ĉi tiu adreso: Sve-
 tislav Kanački, 72 Jubilee Street,
 Mount Waverley Vic 3149.

ĈAMPIONO VIZITIS LA RADION 3ZZZ

La okan de novembro sinjoro Woj-
 ciech Usakowski ĉeestis la lundan
 Esperantan radioprogramon. Tiu
 lerta Esperantisto el Varsovio es-
 tas eksmembro de la estraro de la
 Pola Esperanto Asocio, eksredak-
 toro de ĝia organo, kaj tradukinto
 el Esperanto al la Pola de la libro
La fenomeno Svislando. Li estis
 sendita. kiel reprezentanto de Pol-



Malantaŭe:
 Svetislav Kanački, Lez Farkas,
 Franciska Toubale
 Antaŭe: Wojciech Usakowski

lando, al Melburno por partopreni
 la mond-ĉampionadon pri Skrablo,
 “demokrata ludo”, laŭ li, ĉar viroj
 kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj
 kune konkuras. Kandidatoj por la

titolo venis el 38 diversaj landoj, ĉefe Britio, Usono, Novzelando kaj Afrikaj kaj Arabaj landoj en kiuj ankaŭ la Angla estas parolata, ĉar en la mondĉampionado nur la Angla estas uzata.

Nur ses personoj entute (du Japanoj, du Rumanoj, unu Franco kaj Wojciech) ne praktikas la Anglan en sia ĉiutaga vivo.

Kvankam li ne ĉampioniĝis, Wojciech trovis oportunun plispertiĝi. Ni kore dankas lin pro lia vizito kaj la interesa intervjuo, malgraŭ la mallonga tempo je lia dispo: tuj post la elsendo, li saltis en aŭtobuson direkte al la flughaveno.

• *Laŭ la regularo de la Radio 3ZZZ*, kiu elsendas la ĉiusemajnan programon en Esperanto, oni nepre devas sekvi kursojn dum almenaŭ 25 horoj, antaŭ ol ricevi la rajton prezenti programon. Do laŭ la regulo, mi aliĝis al kurso kun 15 kandidatoj de aliaj programoj: Siria, Egipta, Israela, Kroata...kaj Malta. Tiam mi trovis artikolon en la januara numero de la revuo *Esperanto* en kiu J. Vella-Bondin anoncis ke unu el la kantoj elektitaj de la organiza komitato de Internacia Ĥora Festivalo en Malto estas kanto bazita sur la poemo de la Malta nacia poeto Dun Karm Psaila, verkita Esperantlingve en 1901 en Malto, kun muziko de Carmelo Pace, fama Malta komponisto.

Mi faris fotokopion kaj tradukon de ĝi en la Anglan, kaj donis am-

baŭ al Paul, mia kolego de la Malta programo. Kiam li vizitis sian landon dum la Eŭropa somero, li kontaktis la Esperanto-klubon en Valletta, la ĉefurbo de la insulo. Li intervjuis kelkajn lokajn eminentulojn, i.a. la akademianon D-ro Carmel Mallia, en sia propra lingvo, por disaŭdigo per la Malta programo en Melburno, kaj en Esperanto — mirinde li mem faras la demandojn Esperantlingve! — por nia uzo.

Kelkaj aŭskultantoj jam aŭdis ĝin. La aliaj povas akiri tiun interesan intervjuon pri la Esperanta movado en Malto de Svetislav Kanački. Nun Paul intencas trastudi la internacian lingvon. Nia movado gajnos simpatian homon, verkiston kaj spertulon pri radioelsendoj.

Franciska Toubale □

DIVERSAĴOJ

• *Ekfunkcias Labor-grupo por starigo de la Komisiono pri Oceanio de UEA.*

Celo de ĉi tiu komisiono estas kunligi la kelkajn ekzistantajn Esperantistojn en la Pacifikaj insuloj kaj disvastigi Esperanton ankaŭ en tiun mondoparton, kie ĝi apenaŭ estas konata.

La landaj asocioj de Aŭstralio kaj Nova Zelando kunlaboras por ĉi tiu iniciato.

Unua tasko de la laborgrupo estas kolektado de ĉiuj adresoj de Es-

perantistoj loĝantaj en la Pacifikaj insuloj.

Se vi havas kontaktojn kun Esperantistoj loĝantaj tie, bonvolu informi pri tio la sekretarion de la labor-grupo:

Brian Fox, 634 South Titirangi Road, Titirangi, Auckland 1007, Nov-Zelando. E-poŝte:

brianandjackie@abztrak.co.nz

Se vi havas ideojn pri la plej bona maniero por disvastigi Esperanton tra la Pacifika insularo, aŭ se vi volas kunlabori kun la laborgrupo, bonvolu informi lin.

[el *Ret-Info*] □

• **Tiu, kiu povas kaj volas skribi** 2-, 3-, aŭ 4-paĝan artikolon pri la temo “Kial mi estas Esperantisto” aŭ Miaj travivaĵoj en Esperantio”, por esti ero de libro de artikoloj kies aŭtoroj estos Esperantistoj el diversaj landoj, bonvolu skribi al mi pri tio. Biografieto de la aŭtoro akompanos ĉiun verkaĵeton.

Postal 182, Belém-Pa, BR-66017-970, Brazilo. E-poŝte:

vazpekim@amazon.com.br □

• **Malfermiĝis nova retpoŝta diskutlisto pri Esperanto-instruado** (mallonge: E-INS) kun cento da partoprenantoj. Jam vigle oni tie diskutas pri diversaj temoj de instruado, ekzemple: radio-kursoj, porinstruistaj ekzamenoj, porinfanaj revuetoj, ktp.

La diskutlisto precipe celas helpi la partoprenantojn, por:

- ekkoni la homojn kiuj iel okupiĝas pri instruado de Esperanto;
- renkonti profesiajn instruistojn kaj instrufakulojn, kiuj konas Esperanton, kaj interesiĝas pri ĝia enkonduko en la lerneajn sistemojn;
- publike diskuti pri la diversaj aspektoj kaj problemoj, kunligitaj kun Esperanto-instruado;
- aparte priatenti pri la rolo de la Internacia Lingvo en lerneaj institucioj, en la teknologiaj instrusistemoj, kaj ĝenerale ĉe edukinstancoj;
- konkrete pritaksi la ekzistantajn lernilojn por la IL kaj pri diskuti la ecojn de eventualaj dezirindaj aliaj lernorimedo;
- kontribui al interlanda kunlaborado, ankaŭ per planado kaj realigo de plurnaciaj lerneaj projektoj.

Sugestata diskuttemaro legeblas ĉe:

<http://lps.uniroma3.it/eins/diskuttemaro.htm>

La nova diskutejo gastas en la Pedagogiscienca Laborejo de la Tria Roma Universitato. Interesatoj povas peti aniĝon ĉe:

Mauro La Torre, Universito di Roma Tre, Via Castro Pretorio 20, IT-00185 Roma, Italio

m.latorre@uniroma3.it

[El *Eventoj* n-ro 173, 1/oktobro 1999]



• **La filmo *Incubus*, en kiu rolis William Shatner** (kiu poste famiĝis kiel Kapitano Kirk en la sciencfikcia televid-serio *Star Trek*), estas relanĉita nun en vidbenda for-

mo. Ĝia aparta intereso estas ke ĝi estis longa filmo tute parolata nur en Esperanto (kun subtitoloj en la Angla).

Detalojn pri ĝia produktado, son-specimenon de la forta akĉento de la aktoroj (inkluzive de Shatner) kaj la eblon mendi ĝin oni trovas surrete ĉe:

<http://www.incubusthefilm.com>

[Laŭ *Eventoj* n-ro 173, 1/oktobro 1999]

• La informo ke Hazel Green estas peranto en Aŭstralio por *Literatura Foiro* kaj *Heroldo de Esperanto* ne plu estas ĝusta. La peranto estas nun la Libroservo de AEA.

Literatura Foiro estas dumonata riĉe ilustrata kultura revuo, pri Esperantaj literaturo, dramo, kinarto, lingvistiko, mondliteraturo, ktp, eldonata de LF-koop. Ĝi estas la plej altnivela kultura revuo en Esperantio—mem konvinkigu pri tio! Vi povas peti provkzempleron. Abonu ĉe la Libroservo de AEA.

Ĉu vi scias, ke *Heroldo de Esperanto* estas la plej populara sendependa gazeto de Esperantio? Ĝi estis fondita jam en 1920 de Teo Jung kaj la postaj ĉefredaktoroj

estis Ada Fighiera-Sikorska kaj nun Perla Martinelli. La gazeto, en 16 numeroj jare, fidele informas vin pri ĉio interesa kaj aktuala en la Esperanta mondo. Vi ricevos printempe infomojn pri ĉiuj aranĝoj en la tuta jaro kaj duoblan kongresan numeron. Krome du specifaj numeroj riĉigos viajn sciojn pri apartaj temoj. Abonu ĝin, por ke vi estu taŭge informata. Vi povas peti provkzempleron. Abonu ĉe la Libroservo de AEA.

• **Indiĝenaj Dialogoj** estas nova entrepreno celanta helpi “indiĝenajn” personojn lerni Esperanton. Oni sercas “onkl(in)ojn”, t.e. personojn kiuj akceptas apogi dum unu jaro unu aŭ du kontaktpersono(j)n per retpoŝta korespondado dum ĉi ties kurso, celante la plilernadon de Esperanto kaj la plibonigon de la tradukpovo de la lernanto. Ankaŭ aliaj apogagoj eblas: traduki TTT-paĝon verkitan de la nova “nev-(in)o”; traduki aŭ helpi traduki novajn tekstojn; kc. Detalojn vi povas akiri de Katalin Smidéliusz:

smidik@rik.bdtf.hu, aŭ de

Sylvain Lelarge:

sylvain.lelarge@usa.net

• **Reta Vortaro** estas la nomo de nova per-Interreta Esperanto-vortaro. Oni povas legi ĉe ĝia sito <http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/> simplajn difinojn de Esperantaj vortoj, ekzemple:

sabato: Sepa tago de la semajno, rigardante dimanĉon kiel la unuan,

k ripoztago por la judoj.

La difinoj estas bazitaj sur la malnova *Plena Vortaro*. Ankaŭ troveblas tradukoj por Esperantaj vortoj en kaj el diversaj lingvoj: Angla, Franca, kc.

- **Alia tre utila vortaro** estas *Bazaj radikoj Esperanto-Esperanto* de Wouter F. Pilger, ankaŭ trovebla sur la Reto.

- **La kuba monero** kun Esperantlingva surskribo (eldonita en Havano okaze de la UK de 1990) estas denove havebla. La prezo estas €2 + afranko. La moneroj haveblas de

retbutiko@fel.esperanto.be

aŭ per TTT de

<http://retbutiko.esperanto.be>

- **Kontribuo petata por “50 jaroj por Esperanto, Paco, Ĉinio”**

En majo de la jaro 2000, la redakcio de *El Popola Ĉinio* festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo *EPĈ*, la Esperantomovado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson 50 jaroj por *EPĈ* kaj sincere petas vian kontribuon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al *EPĈ* — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. Viaj Esperantista sperto, opinio pri Esperantomovado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo *EPĈ*.

Viaj kontribuoj povas esti en ajnaj stilo kaj formo. Estas tre bonvenaj koncernaj fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos Ĉinajn metiartaĵojn, Esperantolibrojn kaj unu-jaran abonon de *EPĈ*. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuojn en la rubriko “50 jaroj — *EPĈ*”.

La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de *EPĈ* 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

• el *Interredaktore*

POR RIDIGI VIN

Ĉe la kuracisto

Peĉjo el Peterburgo vizitas la kuraciston de veneraj malsanoj, kiu rigardas lian doloroplenan lokon kaj diras:

“Oni devas amputi ĝin!”

“Sed, sinjoro doktoro, kiamaniere mi poste urinos?”

“Ni faros por vi urinilon el ligno!”

Post la paso de jarduono Peĉjo denove venas al la sama kuracisto.

“Nu, knabo, ĉu denove vi suferas je venera malsano?”

“Ne, sinjoro doktoro, ĉi-foje estas pro termitoj!”

[Laŭ *Eventoj* n-ro 170]



Malantaŭe, de Maldekstre:

Sandor Horvath, Astrid Erb, Arturo Mortimer, Bob Felby, Oveno Franklin,

Antaŭe, de maldekstre:

Max Wearing, Libby Mortimer, Johano Gallagher, Kolino Giles,

Ĥristo Metev.

Krokizis Johano Gallagher

EŬROPA SOMERO KONGRESA TEMPO DE FRANCISKA TOUBALE



Franciska Toubale

Kiel konsciencia satano, ankaŭ ĉijare mi partoprenis la SAT-kongreson, kiu okazis en Karlovy Vary de la 24a ĝis la 31a de julio.

Fakte, antaŭ la kongreso mem, mi partoprenis la tiel nomatan Antaŭ-kongreson, kiun Petro Chrdle preskaŭ decidis nuligi pro la malgranda nombro da aliĝintoj. Sed ĝi finfine okazis en Ceske Budejovice kun dek du partoprenantoj.

Nia Ĉeĥa gvidanto, Lado, montris al ni la neeviteblajn multnombrajn kastelojn de Sud-Bohemio: Ohrada, Hlubokà, Trebon, Cesky-Krumlov, Kratochvile, kiuj atestas la riĉecon de la regiono dum la pasintaj jarcentoj kaj la firmajn rilatojn kun najbaraj landoj kiaj Aŭstrio. Ni ĝuis ankaŭ promenadojn en la naturo en la protektita regiono Ŝumava. Preskaŭ 100 000 hektaroj da arbaro fariĝis nacia parko en 1991. La celo estas protekti la kreskaĵojn kaj la bestojn kaj studi kiel la naturo mem revigliĝas.

Vespere ni malkovris la lokajn muzikon, dancojn, kaj...bieron. Ni renkontis lokajn Esperantistojn. Estis interese paroli pri la komun-

ista periodo, kiun ili travivis en tute malsama maniero laŭ la personaj cirkonstancoj.

Post semajno en tiu etoso, ni estis pretaj renkonti la aliajn cent kvindek Esperantistojn el 25 landoj. Venis deko da junaj Hispanoj kiel observantoj. Krom la labor-kunsidoj pri la agado de SAT, pasintece kaj estontece, okazis kiel kutime kunvenoj de diversaj frakcioj, inter aliaj la libereca kaj la komunista.

La landaj Esperanto-asocioj, kies rolo estas instrui kaj disvastigi la lingvon, ankaŭ kunsidis. Loka sindikatisto prezentis la situacion de laboristoj en Ĉeĥio. Oni aŭdis prelegojn pri diversaj temoj: la banloka tradicio en Karlovy Vary; la homoj mense handikapitaj en la socio; la lukto de la sendokumentuloj en Francio; la ekonomio kaj la sociopolitiko; la Okcitanana, la lingvo de la trobadoroj; Jeroŝenko. Kep Enderby prelegis kun la titolo: "Ĉu eĉ murdinto meritas ricevi justecon kaj ĉu la socio povas toleri tion?"

Kompreneble la programo enhavis ankaŭ muzikon, kantojn, operkaj popol-kantojn, dancojn, kaj viziton al la pitoreska urbo Karlovy Vary kaj ties regiono.

Mi certe ĝuis la gajan etoson kaj riĉan programon de tiu kongreso,

okazigita en bela regiono.

Dum sia vizito al Aŭstralio, Boi sukcesis allogi min al la Dua Azia Kongreso en Hanojo kaj bonfortune la datoj elektitaj—de la 22a ĝis la 25a de aŭgusto—obligis min halti en Hanojo sur reira vojo al Melbourne.

Ĝi okazis en granda hotelo, la hotelo Horison, kiu enhavas komfortajn salonojn de diversaj grandecoj, do bonajn kondiĉojn por debati malgraŭ la ekstera varmego. Partoprenis 400 Esperantistoj kaj kvindekdek da observantoj Vjetnamaj.

La tuta urbo ja aŭdis pri Esperanto pro la flago antaŭ la hotelo, la banderoloj surstrate, la televidaj elsendoj, kaj la artikoloj en diversaj ĵurnaloj. Vendistoj de libroj, memoraĵoj, kaj artaĵoj havis kvaŝaŭ ekspozicion en la enirejo de la hotelo. Kelkaj el la junaj pordistoj tuj lernis kelkajn frazojn en Esperanto.

S-ino Nguyen Thi Binh, vicprezidentino de Vjetnama Socialisma Respubliko, kiel Alta Protektanto de la kongreso, prononcis salutparoladon en la Inaŭgura Soleno. La plejparto de la membroj de la Honorkomitato okupas altajn postenojn en la Vjetnama registaro, do la kongreso ricevis bonan subtenon.

La kongresa ĉeftemo estis: “Kunlaboro por Paco, Stabileco, kaj Disvolviĝo”.

Dum Vjetnama Tago okazis prelegoj pri la renoviĝo kaj la ekstera

politiko de Vjetnamo. Krome, okazis multe da kunsidoj: pri SAT, pri sekso kaj diskriminacio, pri la novaj libroj de post la unua Azia Kongreso, pri la Bahaa kredo, Oomoto, *El Popola Ĉinio*. Ŝajnas ke la Esperantistoj multe zorgas pri sia bonfarto, ĉar okazis kunsidoj pri kuirarto, la sano kaj orienta kulturo, Yumeiho-terapio, la spirita sanigo laŭ Bruno Gröning, Sotai, Japana gimnastiko por forigi rigidecon.

Arbo estis plantita apud lago, tiel restos konkreta memoraĵo de tiuj gravaj tagoj. Kompreneble, ne mankis muziko, dancoj, kantoj, kaj vizito al la fama akvopupteatro. El la junaj Vjetnamanoj, ne multaj regis la lingvon. Mi sentis min iom frustrita, ĉar mi ne povis tiom profunde informiĝi kiom mi ŝatus. Sed ili estis tre entuziasmaj kaj mi opinias ke ili fariĝos gravaj Esperantistoj. Tio estis la celo de la kongreso, ĉu ne? □

POR RIDIGI VIN

Kio estas sekso?

“Io, kion infanoj ne pridiskutas dum la ĉeesto de plenkreskuloj.” (Arthur S. Roche)

“Sekso inter viro kaj virino povas esti mirinda, kondiĉe ke vi estas inter la ĝustaj viro kaj virino.” (Woody Allen)

“Mi kredas, ke sekso estas io bela inter du personoj, inter kvin ĝi estas belega.” (Woody Allen)

Kolektis kaj tradukis: Ionel Onet



Deziras Korespondi

- Marta García Moreno, studentino de Kataluna Filologio, finis kurson de Esperanto en la fakultato pri Filologio de Valencia, Hispanio. Ŝi deziras praktiki Esperanton kun Esperantistoj tra la tuta mondo. Retadreso: margamo@alumni.uv.es
- Pedro Pablo Ramirez estas 35-jara fraŭlo kaj deziras korespondi kun geesperantistoj en Aŭstralio. Li laboras kiel oficisto kaj loĝas en Cartagena, bela kaj trankvila urbo apud la Kariba maro. Li ŝatas muzikon, futbalon, geografion kaj legadon. Antaŭ 14 jaroj li lernis Esperanton, sed li forgesis ĝin iomete kaj volas rememori per korespondado. Adreso: Apartado Aereo #3487 Cartagena, Kolombio. Retadreso: pedro@Esperanto.zzn.com
- Elson estas komencanto kaj volas ke iu helpu lin plibonigi lian Esperanton retpoŝte. Retadreso: morfeuss@usa.net
- Seppo Pietilainen estas 35-jara fraŭlo kiu laboras kiel librotenisto. Li Esperantistiĝis en 1982 kaj deziras geamikojn en Aŭstralio. Adreso: Mannerheiminkatu 25A75 Fin-06/00 Porvoo, Finnlando.
- Marioara Sarac estas 42-jara frizistino kaj laboratoria helpistino kiu ŝatas literaturon, muzikon, mondajn religiojn kaj kuradon. Ŝi deziras longtempan korespondadon kun diversaj homoj 20- ĝis 70-jaraj. Adreso: 39 Calea Romanilor, bloko A1, etaĝo 8, apartamento 34, Arad 2900 Rumanio. Retadreso: marioara_s@yahoo.com
- Anneke Mattson deziras korespondi Esperante kun iu ajn en ie ajna lando. Aĝo ne gravas. Adreso: PO Box 545, Green Valley AZ 85622, Usono.
- Wieslaw Michalak, ul. Wallenroda 7/43, 20-607 Lublin, Pollando: Mi volas korespondi kun samideanoj veladantaj tra la maro aŭ oceano. Laŭprofesie mi estas instruisto pri eduka sporto kaj kapitano de velado. Mi estas viro 49-jaraĝa. Mi estas sola, sen familio; krom tio ne fumanta kaj trinkinta romantika homo :-). Mi serĉas edzinon. info@accatrend.com.pl
Ĉu vi volas esti listita en tiu ĉi kolumno?
 Skribu viajn detalojn al: Penny Vos, 136 Park St, Henley Brook WA 6055, Aŭstralio.
 Aŭ rete: penivos@yahoo.com □

RAPORTO DE LA ESTRARKUNSIDOJ DE NZEA

RAPORTAS DENNIS PEASE

AFEROJ EL LA KUNSIDO DE
LA 2A DE OKTOBRO:

1) Ni diskutis la demandilaron de B McDonald pri la Strategia Plano. Oni sugestis ke ni informu la klubojn kaj anojn de NZEA pri la proponoj en la S.P. kaj petu komentojn kaj sugestojn de ili. Estis decidite starigi subkomitaton de B. McDonald, J. Fox kaj D. Pease por decidi la agadojn farotajn, pri kiuj respondecos pri ili kaj la limdatojn por fari ilin.

2) B. McDonald raportis ke li sendis 3 lernolbrojn de Richardson al D Ryan por distribuado en Velingtono. Li ankaŭ sendis ekzemplerojn al bibliotekoj en la Aŭklanda Regiono sed la ĉefbibliotekistoj devos aprobi ilin. Ni sendos ekzemplerojn al la bibliotekoj de la universitatoj de Otago kaj Massey kaj al la Publikaj Bibliotekoj de Hamilton kaj Palmerston North.

3) Ni ĉiuj kunsentis ke la nova broŝuro estas elstare bona. Oni presis 2000 ekzemplerojn kaj D. Ryan sendis ilin al Esperantistoj tra la lando. Ni diskutis la distribuon kaj oni proponis lernejojn, atendejojn, bibliotekojn ktp.

4) Ni povas senpage reklami en lok-

aj telefonlibroj. La persono kiu enmetas la reklamon devas loĝi en tiu regiono kaj uzi la propran telefonnumeron. Oni proponis ke la plej bona rubriko por la reklamo estas "General Arts and Recreation".

5) D. Ryan preparis informilojn pri la Eseo-konkurso kaj sendis ilin al edukejoj. Detaloj pri la konkurso aperas en nia hejmpaĝo. Ni organizos la kontroladon laŭ la nombro de partoprenantoj.

6) B. McDonald mendis la PAL-version de la vidbendkurso *Pasporto al la Tuta Mondo*. Ni anticipas ricevi ĝin antaŭ la fino de oktobro.

7) Ni diskutis leteron de R Corsetti pri proponita Esperanto-agado en la Pacifikaj Insuloj kaj ni cerbumis pri utilaj kontaktoj en Oceanio.

AFEROJ EL LA KUNSIDO DE
LA 3A DE NOVEMBRO:

1) Ĝis nun nur 6 personoj aliĝis la ANZEK-on en Sidnejo. Ni bezonos minimume 10 por havi kvorumon en nia jarkunsido. J. Fox sendos la aliĝilojn al Terry Manley en Sidnejo tuj post ĉi tiu kunsido.

2) Ni diskutis kandidatojn por la estraro de NZEA en la venonta jaro. B. Fox diris ke li ne plu volas

esti la sekretario. Ni traktos la aferon refoje en la venonta kunsido.

3) La kasisto ne ĉeestos la AN-ZEK-on. Tial estis decidite dividi la rekompencan de vojaĝkostoj kiujn ŝi normale ricevus, inter la help-sekretario kaj D. Pease, kiu prezentos la Financan Raporton.

4) La sub-komitato pri la Strategia Plano ankoraŭ ne kunvenis. Ni decidis prokrasti raporton ĝis la venonta kunveno.

5) La Estraranoj laŭdis la laboron de Sro F. Swift kiu persone kontaktis 130 lernejojn en Christchurch rilate al la Eseo-konkurso. Oni kontaktis 20 lernejojn en la Aŭklanda regiono. La Aŭklanda Esperanto-Asocio reklamos la konkurson en la 8 senpagaj ĵurnaloj en Aŭklando (Suburban Newspapers). D. Ryan informis nin ke oni zorge kontrolos la kvaliton de

la eseoj.

6) B. Fox estas la provizora kunordiganto pri Esperanto-agado en Oceanio. Estas fruaj tagoj, sed estas proksimume 13 kontaktoj en diversaj insuloj tra la Pacifiko. Li sendos la nomojn al UEA. Ni aprobis \$8 por poŝtkostoj.

7) Ni jam metis la novajn broŝurojn en bibliotekojn en Aŭklando kaj Kaitaia. Ni diskutis aliajn lokojn kaj eventojn kie ni povos prezenti ilin. Unu eblo estas la elmontraĵo por La Tago de Homaj Rajtoj (la 10an de decembro).

8) Brad McDonald raportis ke ni ankoraŭ ne ricevis la vidbendkurson *Pasporto al La Tuta Mondo*.

9) B. Fox diris ke la preparo de la *Vortaro Aŭstralazia – Esperanto* okupis multan tempon kaj ke li ricevis multajn sugestojn pri la enhavo.

EL LA REGIONOJ

• Novzelando: Zamenhof-Vespero en Aŭklando

Je la 7a de decembro, la Aŭklanda Esperant-Asocio festis la Zamenhof-Vesperon. Partoprenis 15 homoj, el kiuj 5 estis vizitantoj. Pluraj prezentis programerojn, sed la plej elstara estis tiu de Sro Saeed Sabre el Melburno, kiu montris al ni vidbendon kiun li mem

faris pri la vivo de Zamenhof. La titolo estis *Tago en la Vivo de Zamenhof*. Ĝi estis simpla rakonto kun nur unu rolanto sed ĉarma kaj kortuŝa. Zamenhof preparis prelegon por la UK en Parizo en la jaro 1914. Tamen, li ne povis prelegi en la kongreso ĉar ĝi ne okazis pro la Unua Mondmilito. La entuziasmo kaj kapabloj de Sro Sabre forte im-

ponis nin. Li informis nin ke li nun planas fari filmon pri la vivo de Lidia Zamenhof. Ni tutkore deziras al li sukceson en la nova entreprenno.

Amuza kontribuo estis la poeziaĉo de Howard Gravatt. Kvankam li verkis ĝin plejparte en la Angla, ĝi estis vere taŭga por la okazo. Jen ĝi:

Zamenhofs Tributo

Doktoro Zamenhof you done real good

For now all people can be understood.

Perhaps even I will understand
The man from faraway Swaziland.

Yes, we can easily speak
With Serb, Croat or Greek.

We can always make it plain
In Spain, or to a great Dane.

Everybody can have his say
Instead ekzemple in Swiss or Malay.

Looks will no longer be blanks
Whether from Canucks or Yanks.

People can hold seminars
With the likes of the Bulgars.

Possibly even an Irish navvy
Will be able to easily savvy.
How simple it will be to parley
With the lass from Mali or Bali.

You too can do an interview
With an Afikaan or Bantu.

Also anybody can be verbose
Even in the land of the Eskimos.

And as for that double Dutch
It will not us trouble much.

Now I can write to an addressee
Who usually speaks Swahili.

Or I can have correspondence
With any young French wench.

Dr Zamenhof you fill my needs
No twice boiling cabbages or Swedes.

Do go negotiate, debate, communicate,
Elucidate, articulate in any state. (hic!)

Disvastigante lian Internacian
Lingvon,
Uzante la belegan utilegan Esperanton.

Raportis Dennis Pease.



Grupo de Geelong-ekskursantoj

- **Suda Aŭstralio:** La bonega Zamenhofs Festo 1999 okazis la 13-an de decembro en la jam fame konata Kvakerejo en Nordadelajdo. Inter 25 kaj 30 esperantistoj

kaj simpatiantoj — ni ne sciis ke ni havas tiom da simpatiantoj — ĉeestis kaj partoprenis. Ili venis el preskaŭ ĉie. Unu venis eĉ multajn centojn da kilometroj el Port Lincoln, t.e. nia tre altestimata samideano Sid Grant. Li longe vivu!

La vespero estis longa kaj amuza. Post la bonvenigo farita de la prezidanto ni manĝis. Ni manĝis kaj manĝis! Kaj ankoraŭ iomete manĝis. Tio estis la facila parto. Poste ni komune kantis en Esperanto. Ankaŭ tio estis facila. Ĉiu kunkantis. Ĉiu simpatianto sufiĉe bone konis Esperanton, kaj kunkantis laŭte kaj elegante. Post tio okazis teatraĵoj kaj skeĉoj. Kantoj sekvis ĉiun skeĉon. Eĉ kantis kvarteto. Ĉio estis tre bele kaj amuze prezentita. La festo daŭris ĝis la malfrua vespero, post kiam ni ĉiuj iris hejmen konvinkite ke, malgraŭ ĉio, kaj ĉion konsiderinte, Esperanto estas ankoraŭ la plej lerninda lingvo, kaj ke povas esti eĉ tre amuze dum la lernado! Almenaŭ en Sudaŭstralio! Povas esti neniu dubo pri la fakto, ke tiu ĉi Zamenhoffesto estis la ĝis nun plej bona!

[El *Tamen Plu* januaro 2000]

• **Viktorio:** Lastatempe la Geelonganoj kaj la Melburnanoj decidis renkonti unu la alian pli ofte. Ili jam kune malkovris la parkon Werribee, kadre de la lasta Somera Lernejo en Melburno. La sukceso de tiu evento instigis novan aranĝon. Do, dimanĉon, la 3an de

oktobro, dekkvar Esperantistoj de Melburno kaj unu de Castlemaine, Stan, enrajnigis je 9:30atm al Geelong, kie akceptis la grupon Pat, Ted, kaj Cliff. La piediradŝatantoj babilante marŝis al la Botanika Ĝardeno, kaj la gastigantoj veturigis la aliajn tien.

En agrabla varmeta aero, antaŭ taso da teo, komenciĝis debato pri la propono de Kep Enderby: Ĉu ŝanĝi la emfazon de AEA el “Por”-Esperanta al “Per”-Esperanta asocio, kreante pli profundajn rilatojn kun asocioj kies celo similas nian?



Kep Enderby (dekstre) kun aliaj Esperantistoj

Kion konkludi? Tiom da homoj, tiom da opinioj. Ni atendu la nacian kongreson, dum kiu ni verŝajne plu diskutos la temon.

Post tiu serioza ero, ni bezonis iom da distraĵo. Vizito al la Lanmuzeo kaj malkovro de la ekzotikaj kreskaĵoj de la Botanika Ĝardeno, gajigita de la muziko kaj dancoj de Libana geedziĝo ĝuigis ĉiujn partoprenantojn.

Niaj gastoj estis tre kontentaj trovi pli grandan rondon por uzi la internacian lingvon kaj la Melburnanoj ŝatis malkovri sian

vivlokon, plie sub suno.

Mi antaŭvidas pli da tiuj ekskur-

soj estontece.

Raportis Franciska Toubale □

RUBRIKO DE ODLO BOKSERP

Multaj personoj demandis min pri la nun famiĝinta problemo J2K.

Mi memoras ke kiam mi estis ankoraŭ tre juna koboldo, mia patro parolis al mi pri la baldaŭ okazonta jarmilŝanĝo. Tiutempe la historio de la publiko estis vere tre granda. Oni aŭguris multajn katastrofojn.



Multaj diris ke la abakoj ne plu funkcios. La fabrikantoj de abakoj komencis vendi ekstrajn bidojn, por adapti la ĝistiamajn abakojn al la nova jarmilo.

Aliaj personoj aŭguris la finon de la mondo, aŭ almenaŭ de la civilizacio de ni konata. Oni diris ke la granda piramido de Keopso ekfendiĝos, kaj ke la mumioj dismarŝos la stratojn de la urboj — vere dise, la kapoj flosante en la aero super unu strato, la kruroj marŝante sur alia strato, la toraksoj sur alia, kc. Oziriso mem revenos sur la teron por fari la Lastan Juĝon.

Efektive, nenio tia okazis. Nu, malmulte da ĝi. Kelkaj hieroglifoj sur la Piramido de Keopso ja iom strange aliformiĝis — dank' al... Nu, vi scias kiu, ĉu ne?

Sufiĉas diri ke la fino de la mon-

do ne okazis. Jes ja, la akvo de la Nilo komencis flui de la nordo suden — inverse ol normale — sed niaj inĝenieroj esperas tre rapide ripari tion. Intertempe trankviliĝu. En la palaco de la Faraono jam estis amasigitaj kelkmiloj da amforoĵ da vino prepare al la kaoso okazonta je la jarmilŝanĝo. Do neniu nobelo soifos.

Por ke vi ĉiuj povu ĝui kaj uzi la novan jarmilon, mi pretigis kalendaron por vi.

Januaro 1000						
D	L	M	M	Ĵ	V	S
			1	2	3	4
5	6	7	8	9	10	11
12	13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24	25
26	27	28	29	30	31	

Kvankam nekompleta, ĉi tiu kalendarpaĝo helpos vin trairi la nunan monaton de la novaj jarcento kaj jarmilo, kaj espereble post la fino de la monato la skribistoj estos preparintaj la ceteron de la kalendaro, riparinte siajn ardezojn kaj ardezokrajonojn post la amasdetruigo okazinta je la jarfino.

Feliĉan novan duan jarmilon. □

**LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Aŭstralia Esperanto-Asocio

Prezidanto: Ron Gates, Wangarang,
MSF 2001, Armidale NSW 2350.

☎ kaj faksilo: (02) 6772 3856.

rgates@metz.une.edu.au

Vicprezidantoj:

Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat
Park WA 6014.

vpayne@cygnus.uwa.edu.au

Jenny Bishop, 39 Hill St, Hawthorn
Vic 3122.

esperanto@Education.monash.edu.au

Sekretario: Bob Felby, 6 Dorset St,
Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield
Drive, Mt Waverley Vic 3149.

☎ (03) 9807 8589.

minglis@netspace.net.au

Vickasisto: Dianne Lukes, c/o Post
Office, Meringandan Qld 4352.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Prezidanto: Bradley McDonald, PO
Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, faksilo 09 579 1070.

neelam@voyager.co.nz

Sekretario: Brian Fox, PO Box 8140,
Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.

brianandjackie@abztrak.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Sym-
onds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.

brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5
por familiano[j] ĉe la sama adreso);
\$20 por studento aŭ pensiulo; asocia
membrego: \$10. Bonvolu sendi vian
kotizon al la Kasisto de AEA:
Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt
Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza
paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-
jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu
sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie
Fox, PO Box 8140, Symonds St,
Auckland 1035.

**Unuopaj ekzempleroj de Esperanto
sub la Suda Kruco:** Por membroj,
AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj,
\$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la
Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En
Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe
ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la
konto aeal-w de la Libroservo de la
Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©
2000 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia
en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la
Suda Kruco* estas ©2000 de la Aŭstra-
lia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asoc-
ioj. Represo de enhavaĵo estas perme-
sata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompost-
ita kaj aranĝita de Donald Broadribb
per Power Macintosh 7200, la pro-
gramo uzita estas FrameMaker. Tiparo
uzita estas New Century Schoolbook.
La reteldono estas preparata per
Power Macintosh 6100, per Acrobat.